

La 8an de oktobro 2014

Intervjuoj de Joŝida Masao, la estro de la Nuklea Centralo n-ro 1 de Fukuŝima

Post la nuklea akcidento de Fukuŝima en marto 2011 la Registara Komitato de la esplorado pri la akcidento intervjuis 772 personojn inkluzive de la ministroj, registaraj oficistoj, estraranoj de TEPCO kaj oficistoj de la Nuklea Centralo ktp., kiel ili agadis kaj kion ili faris post la akcidento. Komence la registaro intencis ne publikigi la protokolaron, sed poste malkaŝiĝis ĝiaj partoj en kelkaj ĵurnaloj, do la registaro decidis publikigi la tutan protokolaron.



Mi opinias, ke el tiuj protokoloj tiu de Joŝida Masao, la estro de la Nuklea Centralo n-ro 1 de Fukuŝima, estas la plej grava. Komence mi provis traduki la artikolon en la ĵurnalo Mainiĉi, sed kiam mi legis la artikolon de la ĵurnalo Asahi, mi sciis, ke ambaŭ multe diferencas. Eble la respektivaj ĵurnalistoj elektis resume raportindajn partojn laŭ sia vidpunkto. Do mi rezignis traduki tiujn artikolojn. Mi tradukos resume la originalajn tekstojn laŭ mia vidpunkto, kiujn mi trovis en interreto. Kaj kiam estos necese, mi referencos ambaŭ artikolojn.

Tamen la enhavo estas tro ampleksa kun multaj terminoj, do mi ne estos certa, ke mi povos traduki ĝuste, tamen mi kredas, ke mia tradukaĵo estos pli bona ol nenio.

* Joŝida Masao (1955.2.17 ~ 2013.7.9. Ekde julio 2007 ĝis la 1a de decembro 2011 estis estro de la Nuklea Centralo n-ro 1 de Fukuŝima. Li mortis pro ezofaga kancero.)

Tiu protokolaro konsistas el jenaj « intervjuoj » :

1. Stato de la Centralo kaj agadoj okaze de la akcidento

- (la 22an de julio 2011, ses intervjuantoj, 68 paĝoj en formato A-4)
2. Stato de la Centralo kaj agadoj okaze de la akcidento
(la 29an de julio 2011, ses intervjuantoj, 60 paĝoj)
 3. Stato de la Centralo kaj agadoj okaze de la akcidento 1
(la 8an-9an de aŭgusto 2011, du intervjuantoj, 35 paĝoj)
 4. Stato de la Centralo kaj agadoj okaze de la akcidento 2
(la 8an-9an de aŭgusto 2011, du intervjuantoj, 31 paĝoj)
 5. Stato de la Centralo kaj agadoj okaze de la akcidento 3
(la 8an-9an de aŭgusto 2011, du intervjuantoj, 35 paĝoj)
 6. Stato de la Centralo kaj agadoj okaze de la akcidento 4
(la 8an -9an de aŭgusto 2011, du intervjuantoj, 68 paĝoj)
 7. Bataloj kontraŭ poluita akvo
(la 9an de aŭgusto 2011, unu intervjuantoj, 4 paĝoj)
 8. Supozo pri multe poluita akvo antaŭ la 24a de marto kaj paroloj en la kunsido de la 4a de aprilo
(la 13an de oktobro 2011, du intervjuantoj, 5 paĝoj)
 9. Stato de la Centralo kaj agadoj okaze de la akcidento
(la 6an de novembro 2011, tri intervjuantoj, 66 paĝoj)
 10. Stato de la Centralo kaj agadoj okaze de la akcidento
(la 6an de novembro 2011, du intervjuantoj, 37 paĝoj)

La originala teksto estas legebla sube :

http://www.cas.go.jp/jp/genpatsujiko/hearing_koukai/hearing_list.html

La 11an de marto 2011

--- La unua ondego de la cunamo atingis la Centralon je 15 :27. Ĉu vi havis krizan senton pri kiel haltigi la tri reaktorojn n-ro 1~3 en malvartan staton?

« Jes. Jes, mi havis tre fortan krizan senton. Mi timis, ke kiam la ondoj reiros, ni ne povos liveri akvon al la reaktoroj. Se tio okazos, mi devos enverŝi akvon el aliaj akvofontoj. Ni devos prepari sin por tiu laboro ».

--- Poste vi ricevis informon pri perdo de ĉiuj fontoj de alterna kurento. Kion vi volis fari ?


« Mi estis ŝokita, opiniante, ke la plej kriza afero okazis. Povos okazi severa akcidento. Ni devas esti preta por tio. Ĉu ni ne povos utiligi urĝokazan dizelan generatoron ? Se ni ne povos uzi ĝin, kion mi faru. Se ni

havas urĝokazan kondensilon, ni povas teni la reaktorojn malvarmaj dum kelkaj horoj. Tiaj pensoj turniĝis en mia kapo ».


--- Klariĝis, ke oni ne povas uzi urĝokazan dizelan generatoron.

« Mi malesperis. Mi diris al la stabanoj, ke ili trovu rimedon por malvarmigi la reaktorojn. Mi mem pensis kaj pensis, sed mi ne povis trafi bonan ideon. La gvidilo diras, ke oni funkciigu la dizelan fajroestingan pumpon, sed mi opiniis, ke tio estos malfacila. Ĉiuokaze la plej grave estas pumpi akvon internen. Mi ordonis, ke oni trovu pumpojn uzeblajn per elektra fonto de la reaktordomo n-ro 2.

Difektitaj reaktordomoj de Nuklea Centralo n-ro 1 de Fukuŝima



Sistemo por malvarmigi reaktorojn



--- Kie vi trovis necesan elektran fonton? :

« Por havi fonton de alterna kurento necesas elektrofonda kamiono. Mi petis de la Centra Oficejo de TEPCO, sed mi devis iritite atendi multajn horojn. Mi petis ankaŭ rektfluan elektran fonton por ke oni povu uzi observadajn aparatojn. Tiuj petitaj aĵoj atingis nin iom post iom, sed por ni, la surlokaj laborantoj, ŝajnis, ke ili atingis nin tre, tre malrapide. TEPCO sendis al ni ĉion, kion oni kolektis, sed ni devis klasifiki ilin. Ni devis juĝi, kiuj estas uzeblaj kaj kiuj ne. Por tiu laboro ni bezonis homforton. Tio esti granda perdo. Ni forte deziris, ke TEPCO sendu nur taŭgajn aparatojn ».

--- Ĉu vi ricevis informon pri tio, ke la kondensilo ne funkcias ?

« Ne. Pri la kondensilo la respondeculo plu kredis, ke la sistemo funkcias ».

--- Ĉu vi ne havis maltrankvilon pri difektiĝo de la reaktora kerno ?

« Fundamente mi ne komprenis la situacion. Mi devas mem kritiki nun, sed

ne venis informo de la generatora grupestro. Mi devintus konfirmi la funkcion de la kondensilo. Mi havis antaŭjuĝon. Mi pensis, ke ĝi funkcias bone, ĉar la akvonivelo estis ne tiel malalta. Se venus S.O.S., mi zorgus pri la laborforto, sed mi respondecis pri la tuto, do estis malfacile al mi ordoni ĉion respektive. Nun mi kritikis min pro tio, ke mi ne demandis pri la situacio ».

--- Ĉu vi pensis, ke la kondensilo funkcias en la nokto de la 11a de marto?
« Vidante la akvonivelon, mi estis iom trankvila, sed sentis iom da dubo. La premo en la reaktorsekurujo altiĝis kaj la akvonivelo ne ŝanĝiĝis, kaj poste la premo altiĝis. Pripensante tiujn aferojn, mi dubis pri tiu akvonivelo. Mi havis alian maltrankvilon, nome pri radioaktiveco je la 21 : 51. Mi aŭdis, ke ĝi estas tre forta. Se la sekurujo estus malvarmigita, radioaktiveco ne estus tiel alta, ĉar radioaktivaĵoj ne tralikiĝas. Mi ne sciis la kondiĉon de la reaktoro, sed mi suspektis, ke troviĝas ebleco de difektiĝo de nukleaj brulaĵoj ».

La 12an de marto 2011

--- La ĉefministro Kan atingis la Centralon. Kion vi parolis kun li?
« Li demandis min kun severa mieno, kio estas la stato, do mi respondis, ke preskaŭ ĉiuj elektrofontoj mortis kaj ni ne povas regi la reaktorojn. Li demandis pri “vento” (*urĝokaza eligo de gaso eĉ inkludanta radioaktivecon el reaktorsekurujo por eviti ĝian difektiĝon pro tro alta interna premo), kaj mi respondis, ke ni klopodas sed la situacio estas tre malfacila. Nur tiujn konversaciojn mi memoras ».

--- Je la 6:50 la ministro de ekonomio kaj industrio ordonis “vento-n”.
« Mi koleris. Ni ne povis fari “venton”. Sciante tion, kial li postulas ĝin ? Ordono ne ebligas ĝin. Mi estis en tia mensostato ».

--- Ĉu la interveno de la ĉefministro malhelpis vian laboron?
« Ne. Ni volis malaltigi premon en la reaktorsekurujo, sed ni ne povis. Por teni la reaktoron sekura, ni volis nepre fari tion. Mi ricevis nur malsukcesajn informojn de la stabanoj. Tiuj, kiuj ordonis de supre, ne komprenas nian situacion. Laboristoj estis en malfacilego. Iuj elmetiĝis al 100 milisiveroj da radioaktiveco. Mi decidis, ke fine ni devas fari “venton” per manoj, riskante grandan elmetiĝon, sed en efektiveco ni ne povis eĉ proksimiĝi al la “venta” valvo kaj rezignis fari tion ».

--- Je la 14 :30 oni sukcesis eligi radioaktivajn substancojn per “vento”.

« Se radioaktiveco sur la ellastubo altiĝas, ni povas konstati, ke ni sukcesis “venti”, sed ni ne povis observi tion. Tiutempe televidilo filmis la reaktoron n-ro 1 kaj en la bildo vidiĝis blanka fumo kaj samtempe la premo en la reaktorsekurujo malaltiĝis, tial oni konkludis, ke “vento” sukcesis ».

--- Je la 15 :36 okazis eksplodo en la reaktoro n-ro 1. Kiel vi komprenis la situacion ?

« Mi tute ne antaŭvidis la eksplodon. Tiutempe ni estis pretaj enverŝi akvon. Tiun momenton mi sentis mallongan tremon desube, kaj mi opiniis, ke tertremo okazis. Dume revenis homoj de la laborlokoj kaj raportis, ke la supra parto de la reaktordomo n-ro 1 fariĝis skeleta. Mi demandas min, kio okazis. Revenis ankaŭ vunditoj, kiuj raportis, ke ŝajnas okazi eksplodo. Nun mi scias, ke hidrogeno el la reaktorsekurujo kolektiĝis sub la tegmento kaj eksplodis, sed tiutempe mi tute ne komprenis la kaŭzon. Eble du horojn poste ni atingis tiun konkludon ».

--- Kia, vi pensis, estis la stato de la reaktora kerno de n-ro 1 antaŭ tiu eksplodo ?

« La premo en la reaktorsekurujo estis alta, do ni klopodis fari “venton”, sed ankoraŭ nun mi ne estas certa, ke vere la “vento” estis plenumita, ĉar nenie funkciis monitoroj. Tiam ni klopodis fari “venton” kaj enverŝadon de akvo ».

--- Je la 14 :53 fajrobrigadanoj enverŝis 80 tunojn da akvo kaj je la 14 :54 estis instrukcio de la centralestro pri enverŝado de marakvo.

« Mi jam instrukiis pri enverŝado de marakvo. Ni ne povis preni marakvon rekte de la maro, ĉar mankis pumpoj. Mi sciis, ke troviĝas multe da marakvo en la tereno de la reaktordomo n-ro 3 postlasita de la cunamo kaj mi jam decidis uzi ĝin kaj instrukiis tion je la 14 :54 ».

--- Ĉu vi jam aŭdis sperton pri enverŝado de marakvo en la reaktorsekurujon antaŭe?

« Tute ne. Oni neniam faris tion en la tuta mondo, sed nur marakvon ni povas uzi senlime, do ni ne havis alian elekton. Ni klopodis nur du aferojn : malaltigi premon en la reaktorsekurujo kaj liverigi akvon en ĝin. Aliaj aferoj estis bagatelaj. Por regi la furiozan reaktoron, ni devis dependi nur de marakvo ».

--- Ĉu vi ne pensis, ke se vi uzos marakvon, ĉiuj aparatoj fariĝos neuzeblaj kaj oni bezonos multege da mono?

« Tute ne. Ĉar la brulaĵoj estas difektitaj, oni ne plu povos uzi tiun reaktoron. Do kiel regi ĝin estas la plej grave. Mi neniam pensis pri ĝia reuzo ».

--- Troviĝas raporto pri la horo de enverŝado de marakvo. En ĝi estas skribita, ke je la 20:20 oni komencis enverŝi marakvon, sed laŭ la raporto de TEPCO la horo estas la 19:04. Kial okazis tiu diferenciĝo?

« Tuj post kiam ni komencis enverŝi marakvon je la 19:04, venis telefono de Takeguro Iĉiroo de TEPCO, dirante, ke la registaro ankoraŭ ne permesas enverŝadon, sed mi tute ne intencis haltigi ĝin, do mi ordonis al la respondeca stabano, ke li neniam haltigu tion, kvankam mi raportos al TEPCO, ke mi haltigos ĝin. Poste venis permeso de la registaro, kaj ni decidis raporti oficiale, ke la enverŝado komenciĝis je la 20:20 ».

--- Je la 20 :45 estas raporto pri enverŝado de akvo kun borakso. Kial vi uzis tiun miksitan akvon je tiu horo ?

« Mi volis uzi borakson dekomence, sed estis tre radioaktive kaj oni bezonis tempon por solvi ĝin, do mi decidis enverŝi akvon unue kaj kiam la boraksa akvo estis preta, ni uzis ĝin. Kaj tiam estis la 20:20.

--- Kiam okazis eksplodo en la reaktordomo n-ro 1, ĉu vi diskutis pri la rimedoj preventi eksplodon en aliaj 5 reaktordomoj ?

« Jes, kompreneble. Pri la reaktordomo n-ro 2 hazarde la elblovpaneloj (*blow-out pannel*) estis malfermaj, eble dank' al la premo el la eksplodo de la reaktordomo n-ro 1, do mi estis iom trankvila. Pri la reaktordomo n-ro 3 ni cerbumis multe kaj eĉ volis peti de la defendkorpuseroj fari truojn per maŝinpafiloj ».

La 13an de marto 2011

--- Post kiam la malvarmiga sistemo HPCI haltis ĝis akvoenversiĝo je la 9:20, estis 6 horoj kaj 40 minutoj. Kion vi pensis pri la stato de la reaktoro n-ro 3 ?

« Tiam mi pensis, ke mi mortos. Mi volis enverŝi akvon plej frue, sed la kondiĉoj ne estis aranĝitaj ».

--- Frumatene de la 13a de marto la malvarmiga sistemo HPCI de la reaktoro n-ro 3 haltis, do vi provis enverŝi akvon per RCIC (la sistemo por malvarmigi la reaktoron per akvo en la kondensilo), sed vi malsukcesis, sekve vi juĝis, ke la malvarmiga sistemo de la reaktoro estis perdita je la

4 :15. Ĉu vi komprenis tiam, ke ne malmulte da parto de la nukleaj brulaĵoj estas jam nuda ?

« Kompreneble, jes. Tial mia plej grava tasko estis haltigi tiun staton kiel eble plej frue, sed ni ne povis prepari la rimedojn. Eklsteraj homoj kritikis nin, dirante, ke ni tre malrapide laboras. Mi ne pardonas ilin. Ni, malmultaj homoj, laboris kontraŭ la tri friozaj reaktoroj ».

--- Estis la 9 :20, kiam vi sukcesis enverŝi akvon en la reaktoron n-ro 3.

« Akvo eniris kaj la premo kaj la akvonivelo eknormaliĝis. Mi estis tre ĝoja. Sed en efektiveco mi estis trompita de la difektita akvonivelmezurilo. Mi komencis trakti la reaktoron n-ro 2. Neniam estis kaj estos homoj, kiuj batalis/os kontraŭ tri akcidentaj reaktoroj samtempe. Mi ne volas plu rememori la aferon ».

--- Ĉu vi pensis, ke estas necese zorgi pri la akvujo por uzitaj brulaĵoj en la reaktordomo n-ro 4 ?

« Jes. Kiam okazis la tertremo, la reaktoro n-ro 4 estis ekzamenata. Do ĉiuj 548 brulaĵaroj estis elprenitaj kaj metitaj en la akvujo. Ili estis bruligitaj dum unu jaro, do plej varmaj kaj plej malfacilaj por trakti. Do mi pensis tre grave kiel trakti la reaktordomon n-ro 4 ».

La 14an de marto 2011

--- Ĉirkaŭ la 7a matene la reaktoro n-ro 3 fariĝis tre malnormala kun forta radioaktiveco kaj alta premo.

« Mi raportis, ke la reaktoro n-ro 3 estas en la sama stato kiel la reaktoro n-ro 1. Estis ebleco de eksplodo, tial je la 9 :30 aŭ je la 10 :00, mi ordonis al ĉiuj fuĝi al kontraŭtertrema ĉefstabejo antaŭ la eksplodo okazinta je la 11:01. Venis telefono de s-ro Mutoo de TEPCO. Laŭ lia peto, mi sendis homojn al la laborloko, kaj okazis eksplodo. Mi devas pardonpeti de la defendkorpuseroj, kiuj ekiris al la akvujo per sia kamiono kaj komencis labori, kaj tiun momenton okazis la eksplodo ».

« Komence venis informo pri malapero de 40-kelkaj homoj. Tiam mi intencis morti. Se mortis tiom da homoj, mi devis morti per *harakiri*. Poste klariĝis, ke nur kelkaj vundiĝis kaj neniu mortis. Tio estis feliĉo el grandegaj malfeliĉoj. Mirinde neniu mortis en la loko, kie faladis betonaj detruitaĵoj el la reaktordomo. Certe Budho benis nin ».

--- Okazis la eksplodo je la 11 :01, kaj poste oni komencis denove labori.

Kiel vi decidis tion ?

« Ĉiuj estis konsternitaj kaj ne sciis kion fari. Do komence mi pardonpetis de ili pro mia misjuĝo pri la situacio kaj diris: ‘Nun akvoenverŝado haltis. Se ni faros nenion, la situacio fariĝos pli terura. Mi petas, ke vi iru por forĵeti detruitaĵojn kaj ripari hosojn. Atentu pri radioaktiveco’. Je mia emocio, ĉiuj fariĝis tre pozitivaj iri por labori. Post mia aranĝado de diversaj laboroj ili eksteren iris. Dum tiu laboro plejparto de ili elmetiĝis al radioaktiveco ĝis la maksimuma limo. Dank’ al ilia laboro ni sukcesis enverŝi akvon je la 16:30 ».

--- Pri la reaktoro n-ro 2, kiamaniere vi intencis enverŝi akvon?

« Premo estis tiel alta, ke ni ne povis enverŝi akvon. Do la unua tasko estis malaltigi la premon. Ni diskutis pri la rimedoj. Tiam venis telefono de la ĉefministrejo kaj s-ro Madarame (tiutempa estro de la Atomenergia Komitato) ordonis al mi malaltigi la premon kaj enverŝi akvon, kaj samon kriis s-ro Ŝimizu (tiutempa prezidanto de TEPCO) en la TV-kunsido. Mi miris, kial ili povas postuli tiujn aferojn, ne sciante la situacion ĉi tie. Ĉiuj volas enverŝi akvon, sed por tio ni devas unue prepari, sed ili ne komprenas tion. Ili simple pensas, ke ni hezitas. Mi volus bati tiajn homojn ».

--- Vi bezonis multan tempon por malaltigi la premon. Kio estis la kaŭzo?

« Ankaŭ mi ne bone komprenas. Unue mankis baterioj. Ni provis malfermi la valvojn diversmaniere sed vane, kaj la akvonivelo pli kaj pli malaltiĝis. Ni estis plej proksimaj al morto. Se ni ne sukcesos malfermi ilin, ni havos neniun rimedon, sed fine ni sukcesis. Tamen ĉi-foje benzino elĉerpiĝis en la fajrobrigada kamiono, ĉar ĝi longe atendis nin. Ĝi reiris por ricevi benzinon kaj finfine ni povis enverŝi akvon. Mi revivis. Ĝis tiam mi estis preskaŭ morta. Ĉiun kvaran horon tiu ĉi fajrobrigada kamiono devas ricevi benzinon. Dum la atendado kaj la veturado por benzino stabanoj elmetiĝas multe al radioaktiveco. Tiuj, kiuj elmetiĝis al centkelkdek milisivertoj da radioaktiveco, laboris por konstrui akvohosojn kaj liveri benzinon ».

--- Dume stabanoj de TEPCO laboris en tre forta radioaktiveco.

« Inter ni estis unu virino, kiu zorgis pri benzino por fajrobrigado. Ŝi laboris tre aktive kaj lerte. Mi volis, ke ŝi retiriĝu, sed ŝi rifuzis. Ŝi havis tre fortan devsenton. Ŝi restis en la kontraŭterrema ĉefstabejo kaj sidis apud la pordo. La eksplodo de la reaktordomo n-ro 1 difektis la pordon kaj tra la fendoj envenis ekstera aero kun radioaktiveco, tial ŝi elmetiĝis al radioaktiveco pli ol la limo kaj suferas ankaŭ pro interna elmetiĝo. Ŝi

laboris kun misio, sed amaskomunikiloj traktis ŝin kiel la ekzemplon de malbona administrado de la Nuklea Centralo. Mi sentas fortan koleron kontraŭ tiaj aĉaj amaskomunikiloj ».

--- Temperaturo de la akvujo de la reaktoro n-ro 4 estis 84 gradoj je la 4 :08. Ĉu oni devis fari ion en tiu stato ?

« Jes. Ni devis enverŝi akvon, sed al ni mankis laborforto, ĉar ni devis zorgi pri tri reaktoroj. Do mi petis TEPCO-n mem fari ĉion ajn por la reaktoro n-ro 4 ».

La 15an de marto 2011

--- Inter la 6a kaj la 6:10 matene la 15an de marto aŭdiĝis eksplodbruo. Ĉi vi sentis impulson aŭ aŭdis bruon en la kontraŭtertremaj ĉefstabejoj?

« Ĝi ne sentiĝis en la ĉefstabejoj. Al mi venis informo pri la brueto 'pon'. Mi opiniis, ke povis okazi difektiĝo de la reaktorsekurujo kaj tio estas tre kriza afero. Mi ordonis, ke krom ĉefaj stabanoj ĉiuj rifuĝu. Dume venis alia informo de la stabo, kiu iris al la reaktordomo n-ro 4, ke la supraĵ muroj de la reaktordomo disfendiĝis. Mi ankoraŭ ne povas diri, ĉu tiu bruo venis de la reaktordomo n-ro 2 aŭ de la reaktordomo n-ro 4 ».

--- Ĉu ĉirkaŭ tiu horo venis la ĉefministro al la Centra Oficejo de TEPCO?

« Jes. En televido mi vidis la prezidanton kaj aliajn gravulojn de TEPCO kolektiĝi, kaj la ĉefministro ege kolere kaj kriis. Dume okazis tiu kritika afero, do mi diris al TEPCO, ke mi rifuĝigos la stabanojn. Ni, kiuj laboras surloke, devas prepari nin por la plej malbona okazo, do ni preparis busojn kaj rifuĝigis la stabanojn al la Nuklea Centralo n-ro 2 ».

--- La reaktordomo n-ro 2 estis en malfacilo, kaj vi konstatis la difektiĝon de la reaktordomo n-ro 4, kaj poste okazis fajro. Kiu konstatis ĝin?

« Estis tiel radioaktive ĉirkaŭ ĉiuj reaktordomoj, ke eĉ en la centraj manipulejoj oni ne povis deĵori, do fojfoje stabanoj iris tien por akiri donitaĵojn. Unu el tiuj stabanoj vidis fumon el la reaktordomo n-ro 4. Mi konstatis ĝin per binokulo, ĉar tiutempe TV-sistemo ne funkciis. Ne venis fajrobrigadanoj pro forta radioaktiveco, do mi telefone petis de s-ro Hosono (tiutempe la ministro pri medio), ke li petu de la japana defendkorpuso aŭ la usona armeo la helpon. Sed antaŭ ol ilia helpagado la fajro estingiĝis ».

--- En la reaktordomo n-ro 4 la supra parto difektiĝis, kaj fajro okazis en la 3a aŭ la 4a etaĝo kaj en la 16a de marto denove vidiĝis fajro. Kion, vi

opiniis, okazis tie ?

« Mi ne komprenis, el kie venis la unua bruo, do mi suspektis, ke brulaĵoj en la brulaĵarakvujo trovarmiĝis kaj eksplodis. Sed poste mi konstatis, ke la brulaĵaroj estis en la normala stato, do la kaŭzo ne estas tiuj brulaĵaroj. Nun multaj diras, ke hidrogeno el la reaktordomo n-ro 3 eniris kaj eksplodis, sed mi ne kredas tion, ĉar mi ne komprenas, kiamaniere la gaso eniris en la reaktordomon n-ro 4 kaj kial nur la suda kaj norda muroj rompiĝis. Ne troviĝas truoj en la orienta kaj okcidenta muroj ».

* La artikolo en la ĵurnalo Mainiĉi raportas la enhavon laŭ tagoj ĝis la 15a de marto kaj mi sekvis la manieron de Mainiĉi. Pri la postaj tagoj Mainiĉi raportas laŭ temoj, kaj ankaŭ mi opinias, ke tiu maniero estas bona. Do de nun mi tradukos laŭ temoj.

Vico de farendaj aferoj

--- Troviĝas dokumento de la 10:04 de la 16a de marto, en kiu estas skribita « Vico de farendaj aferoj ». La 1a estas akvoenverŝado al la brulaĵarakvujo de la reaktoro n-ro 4, la 2a estas reconstruo de ekstera elektrofonto, la 3a estas konstrui vojon por elektrofontaj kamionoj kaj la 4a estas akvoenverŝado al la brulaĵarakvujoj de la reaktoroj n-roj 1 kaj 3.

« En la reaktordomo n-ro 4 estis varmegaj brulaĵaroj. Mi timis, ke ili estis difektitaj, do normaligi la staton estis tre grave. Mi volis, ke ni riparu aparatojn kaj por tio elektro estas la plej grava. Do unue restarigi eksteran elektrofonton kaj se tio ne eblos, uzi elektrofontan kamionon. La reaktordomo n-ro 2 ne estis difektita, do anstataŭ enverŝi akvon, ni intencis fari ĝian riparadon ene ».

--- la 17an de marto ni malvarmigis la reaktoron n-ro 3 anstataŭ n-ro 4. Kial oni ne malvarmigis la n-ro 4 unue ?

« Matene la 17an de marto flugis helikoptero sur la Nuklea Centralo kun nia stabano. Li vidvendigis la reaktordomon n-ro 4, kaj ni vidis akvon en la brulaĵarakvujo. Tial ni unue malvarmigis la reaktoron n-ro 3 ».

Ĉu efikis akvoenverŝado de la defendkorpuso?

--- La defendkorpuso enverŝis akvon per helikopteroj kaj per altpremaj fajrobrigadkamionoj kaj la policperfektejo kaj la buroo de fajrobrigado enverŝis akvon per altpremaj fajrobrigadkamionoj. Kiuj estis efikaj kaj kiuj ne estis efikaj ?

« Malkaŝe dirite, ĉiuj agadoj de la defendkorpuso estis senutilaj. La akvokvanto estis tro malgranda kaj estas dubinde, ke la ĵetita akvo trafis la celon. Ankaŭ la agadoj de la policperfektejo kaj la buroo de fajrobrigado estis senutilaj ».

--- Poste iris Ĝirafoj kaj Elefantoj (*kamionoj por enverŝi betonon per altegaj kaj longegaj hosoj). Ĉu ili efikis?

« Ili efikis. Oni fiksas la hosojn ĝuste supre de la reaktoro, do oni sukcesis trafe enverŝi akvon ».

Helpantoj el Niigata

--- Ĉu la rifuĝintaj stabanoj iom post iom revenis?

--- La 15an de marto ĉiuj rifuĝis al la Nuklea Centralo n-ro 2. Poste kelkaj tuj revenis kaj pli poste stabanoj iom post iom revenis, ĉu ne?

« Jes. La tereno estis tiel radioaktiva, ke mankis homoj, kiuj respondecas pri mezurado kaj esplorado de radioaktiveco. Do venis nemalmultaj helpantoj el la Nuklea Centralo de Kaŝiuazaki-Kariŭa en la gubernio Niigata ».

--- Se okazos akcidento, ĉu oni devos voki helpantojn el aliaj Nukleaj Centraloj?

« Fundamente jes, sed unu problemo estas, ke ekipaĵoj pli kaj pli ŝanĝiĝas kaj ĉiuj centraloj havas siajn proprajn ekipaĵojn. Do povos okazi, ke helpantoj el Kaŝiuazaki ne povas ripari ilin. Kaj alia problemo estas, ke dungitoj de TEPCO faris laboron, ne rekte sed helpate de laboristoj de subaj kompanioj. Resume, homoj ne povas tuj adaptiĝi al novaj ekipaĵoj, kaj la dungitoj de TEPCO ne havis spertojn rekte kaj mem ripari ilin ».

Pri poluita akvo

--- La 1an de aprilo la ministro de medio s-ro Hosono kontraŭis la forĵeton de poluita akvo en la maron.

« Kiam mi aŭdis lian diron, mi miris pro tio, kion oni faros pri la poluita akvo. Ni enverŝadis akvon en la reaktordomojn kaj tiu akvo eligas ien. Ni devas trakti tiun akvon, sed tiu problemo ne estis la komuna temo inter la Centra Oficejo de TEPCO kaj la Subministerio pri Nuklea Industria Sekureco. Pro tio mi estis tre iritata ».

--- Laŭ la raporto de la 2a de aprilo, malkovriĝis, ke multe poluita akvo eligas el la reaktoro n-ro 2.

« En la matena kunsido de la 4a de aprilo mi estis ordonita ĉesigi la eligon, sed neniu proponis kiamaniere trakti la akvon kaj kie konservi la akvon, do mi diris en laŭtega voĉo, ke oni pripensu serioze, kaj nur poste oni komencis pensi pri tiu afero ».

--- Ĉu la altiĝinta akvonivelo de la reaktoro n-ro 3 instigis vin laŭte postuli pri la poluita akvo?

« Jes. Mi opiniis, ke ni devos forĵeti poluitan akvon eksteren por malplenigi la reaktordomon n-ro 3, ĉar nenie estas loko por forĵeti tiun akvon ».

--- Pri la akvo en la subdefluilo de la reaktordomoj n-roj 5 kaj 6.

« Se la akvo difektos la elektran sistemon, ni perdos la rimedon por malvarmigi la reaktoron, sekve okazos kritika afero. Do mi opiniis, ke ni devas ĉiamaniere forĵeti la akvon eksteren ».

--- Oni decidis forĵeti 1500 tunojn da poluita akvo. Kion vi pensis pri tiu decido.

« Mi volis eligadi akvon el la subdefluilo, do mi miris, kial oni decidis tiun kvanton ».

--- Ni aŭdas, ke kiam la reaktoro n-ro 6 fariĝos kritika pro akvoinundo, vi jam decidis forĵeti ĝin sen permeso de la registaro.

« Jes, mi decidis tion por protekti la uzinon, eĉ se oni maldungos min. Se la reaktoro n-ro 6 estos inundita kaj la elektra sistemo estos perdita, tio povos kaŭzi kernofandiĝon, do tio estis tre grava temo ».

Akcidento en 1991 kaj la tertremo de Ĉuuecu

La reaktoro n-ro 1 havis akcidenton pro akvotralikiĝo en 1991. Pro tiu akcidento preskaŭ ĉiu sistemo por malvarmigo mortis. Ĝi estis tre granda akcidento, eble unue aŭ due danĝera akcidento en Japanio, sed oni ne taksas ĝin tia. Je tiu akcidento mi sciis danĝeron de akvo, kaj ni devas prepari rimedon kontraŭ akvotralikiĝo, sed novigi malnovajn reaktorojn, jam konstruitajn, estas malfacile. Ni faris diversajn renovigojn, sed fari renovigojn perfekte estas tre malfacile, ankaŭ pro mono. Ni devas sekvi la principon, sed por adopti ĝin estas multaj malfaciloj.

Kiam la premiso, ekzemple pri antaŭvidata grandeco de eventuala cunamo, ŝanĝiĝas, la plej bone estas konstrui novajn instalaĵojn, sed se tio ne eblas, ni utiligas aŭ parte renovigas malnovajn. Tia estas nia maniero. Tamen grandeco de ĉi-foja cunamo, 15 metrojn alta, estis ekster nia antaŭsupozo, do ni ne povus adaptiĝi per tiu kutima maniero.

Kiam okazis la Ĉuuecu-tertreto en 2007, kiu difektis samtempe plurajn instalaĵojn de la Nuklea Centralo de Kaŝiŭazaki-Kariŭa. Tio estis granda damaĝo sed ĝi haltis sekure. Malgraŭ tiu grandega tertremo, la reaktoroj sekure haltis. Poste ni ekzamenis la ekipaĵojn, sed preskaŭ ĉiuj ekipaĵoj estis senvundaj. Ni opiniis, ke la tertremo venas momente kaj havas grandan energion haltigi ĉiujn reaktorojn, sed tiu tertremo ne perdis ĉiujn fontojn de malvarmigo. Ĝi estis multe pli granda ol tiu supozita, kiam la Centralo estis konstruita, sed la reaktoroj sekure haltis. El tiu fakto ni venis al la trofida konkludo, ke la japana projekto estas ĝuste farita.

Retiriĝis aŭ ne

« Estis tempo, kiam ni ne povis enverŝi akvon en la reaktoron n-ro 2. Mi malaltigis la premon, sed fajrobrigadaj kamionoj ne funkciis pro manko de benzino, do estis horoj, dum kiuj ni ne povis enverŝi akvon. Tiam mia koro bategis ĉiun sekundon, timante, ke vere ni ne povos enverŝi akvon. Se ni malsukcesos, okazos kernofandiĝo, eligrante kvantegon da radioaktiveco, sekve ni ne povos iri al la reaktoroj n-roj 1 kaj 3, kaj sekve tiuj reaktoroj estos en la sama kriza stato, kaj fine eĉ en la Nuklea Centralo n-ro 2 oni ne povos labori. Tio, kion mi povis fari dum tiuj horoj, estis nur atendi preĝante.

En tiu situacio mi telefonis al s-ro Hosono, tiama ministro de medio, ke krom teknikistoj, respondeculoj pri riparado kaj akvoenverŝado, fajrobrigadanoj, manipulistoj kaj ankaŭ mi, mi povos rifuĝigi la ceterajn provizore al la Nuklea Centralo n-ro 2. En televido oni uzis la vortojn 'retiriĝo de ĉiuj', sed mi neniam uzis tiujn vortojn. Mi forte protestas pro tio ».

(Fino de traduko)

Sube mi tradukis la protokolaron de Joŝida, laŭ mia vidpunkto kaj laŭ mia intereso, foliumante la paĝojn. En la artikolo de la ĵurnalo Asahi, oni skribis jene kun la vortoj de Joŝida, kiujn mi ne povis trovi:

Malhelpate de la detruitajoj kaj radioaktiveco, akvoenverŝado per fajrobrigadaj kamionoj ne sukcesis, kaj la premo en la reaktorsekurujo superis la limon. Proksimiĝas danĝero, ke kvantego da radioaktiveco disĵetiĝos vaste. Tiun situacion s-ro Joŝida esprimis: "Okazos Ĉina

sindromo”, “Nia imago estis detruo de la tuta orienta Japanio”.

Tradukinte mi havis jenajn opiniojn :

1. Komence la registaro intencis ne publikigi tiun protokolaron. Tio ne estas permesebla sinteno de la registaro. La popolanoj havas rajton scii la veron. Ĉiuj suferis/as pro la nuklea akcidento, do ni havas rajton scii kiel eble plej multe. Se ni ne havus informon komune inter ni pri tiu grava akcidento, kiamaniere ni povus preventi denovan akcidenton? Certe la registaro, kiu volas refunkciigi la nukleajn centralojn, ne volis, ke la popolanj havu veran kaj teruran informon pri la danĝero de atomenergio.

2. Ni ne povas 100 procente dependi de amaskomunikiloj. Asahi kaj Mainiĉi estas relative konsciencaj ĵurnaloj, sed la enhavoj de la respektivaj artikoloj estas tre malsamaj. Eble Jomiuri kaj Sankej, dekstraj ĵurnaloj, traktis la protokolaron laŭ tute aliaj vidpunktoj. Ni devas legi la originalan tekston, kaj devas eĉ vidi, kio okazas/is malantaŭ tiu originalo.

3. Kiam TEPCO konstruas kaj renovigas la Centralon, ŝajnas, ke la plej grava estas mono. Ekzemple por renovigi aŭ pli altigi la kontraŭcunaman digon, ĝi bezonas multege da mono. Ĝi ne volas elspezi tiom da mono por cunamo, kiu povos ne veni. Se la digo ne estus por la nuklea centralo, tiu sinteno povus esti permesebla, sed la nuklea centralo kaŭzas tute alispecan danĝeron. Kiam mono regas, ĝi ests ĉiam danĝera kaj ĝi ne rajtas ekzisti.

4. Fine mi sendas kondolencon al s-ro Joŝida, kiu mortis juna, sin donante al la batalo kontraŭ la akcidento.

HORI JASUO